- \*VOcable (dusemajna / bimensuel ?), 62 (2-4-1987) (p6) fk
- Voĉo de handikapuloj (dumonata/bimestriel, Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj, Berovo, Y), 1984 (1-a jaro) 1985 1986
- \*Wermlands-Tidningen (N), 29-6-1989 nk fk
- \*World (duonjara / semestriel, International Association for Religious Freedom, Oxford, GB), 1994 1995 1996/1
- X : Informilo de esperantista grupo « Ikso » ĉe Tjumena Universitato (dumonata / bimestriel, Aleksandr Zagvazdin, Tjumenj, URSS), [1?]-3 (6-1990)
- Yes ! Sidiju kai taipu ! (duonjara / semestriel ?, AEIOU, 31017-Toulouse, F), 1 (3-1994) 2-5 (2-1996)
- Znahr : Ĵurnalo por populara medicino (semajna, Prof. d-ro Halis Okan, Sofia, BG), 29-7-1992
- (Stato je la fino de majo 1996)**  
**(Etat à la fin mai 1996)**

Balagué, den 4-04-96

Kjaere Christian,

Det er med stor glede jeg treffer deg igjen i Sør-Frankrike etter de to og ett halvt år som gikk siden siste gang. Du er like hyggelig og i like godt humør som vanlig, noe som gjør det lettere å glemme det vi ville i Norge karakterisere som et primitivt levekar. Greit å minnes – for en miljøaktivist og grønn politiker som meg – at det går an å leve enkelt og være lykkelig.

Takk for det korte oppholdet. Jeg kommer sikkert tilbake ...om sommeren, når en ikke trenger å frye i peisen ! Vennlig hilsen

**Claude Rouget**

(snart eks-franskmann bosett i Nord-Norge)

*Mi ne povas esperante skribi\**, do mi skribas en la franca. Mi pasis bonan semajnon, tre specialan. Ĝis baldaŭ

**Vincent**

\* Tio ĉi tamen estas skribita en esperanto !

De la 1-a ĝis 18-a de dec. 1995 Almozulo ? Vagabondo ? Pasanto ? Pilgrimo ? Mia vojo kondukis min en tiun ĉi valon, kie mi retrovas la varmecon de l'amikeco, same efikan, se ne pli, kiel tiuj kamenaj fajroj. Multaj promenadoj kaj babiladoj, kelkaj taskoj por prepari la vintridon (jam komencita !), bonaj legadoj... Restado markinda per blanka ŝtoneto !

Dankon, Christian, pro ĉia akcepto kaj... (*Sira(k)ido* 6,15-17;9,14-15)\* Se ĉio okazas kiel antaŭvidite mi sendos al ĉi novaĵojn el Italio. Kaj pasos poste. Ĝis baldaŭ.

**Gilles**

\* Duakanona libro de la katolika Biblio, ankaŭ nomita *La Eklezia* [Libro] (*Ecclesiasticus* [Liber]):

*"Fidela amiko ne havas prezon, oni ne scipovus pesi ties valoron. Fidela amiko estas viviga balzamo, lin trovos kiuj timas la Sinjoron [aŭ : antaŭ Li]. Kiu timas la Sinjoron havigas al si verajn amikojn, ĉar kia oni estas, tia estas la amiko kiun oni havas."*

La 22-an de majo

Mi ne iris al Romo nek Asizo ĉar la peto kiun mi havis en la koro estis elaudata antaŭ mem ol mi formale esprimis ĝin. Ekde februaro mi estas "donita" fratulo ĉe la *Komunumo de la Ŝafido*, kaj hodiaŭ survoje al Lourdes, kien mi estas sendita por porti per la preĝado la fondojn en Vieno, Romo, Barcelono, Buenos-Ajres, Luars (Ĉilio)... kaj la deziron de la Komunumo kiu esperas novajn alvokiĝojn (ni estas 50 fratulinoj kaj 12 fratuloj).

Mi donacas al mi halton ĉe la paroĥestrejo... Ĉi-matene la suno partoprenas, do "Kia ĝojo kiam oni diris al mi : ni iru en la domon de la Sinjoro..."

Ĝis baldaŭ, ĉe la *Ŝafejo Sankta Petro* ? **Gilles**

Balagué, la 4-an de aprilo 1996

Kara Christian,

Kun granda ĝojo mi retrovas ĉin en Sud-Francio post kiam du jaroj kaj duono pasis ekde la lasta fojo. Ĉi estas same simpatia kaj en sama bona humoro kiel kutime, io kio igas pli facile forgesi kion en Norvegio oni karakterizus kiel primitivajn vivkondiĉojn. Bonege estas memori – por mediaktivista kaj verda politikisto kiel mi – ke eblas tiel vivi kaj esti feliĉa.

Dankon por la mallonga restado. Mi certe revenos ...somere, kiam oni ne bezonas fari fajron en la kameno ! Amikan saluton

**Claude Rouget**

(baldaŭ eks-franco, fiksiĝinta en Nord-Norvegio)

**Najbare: 4a IKTES en Calella (Katalunio)**

*Internacia Kultura kaj Turisma E-Semajno*

De la 5-a ĝis 22-a de okt. 1996, ĉe Hotelo Miami.

*"Kun strando tri kilometrojn longa, el dika sablo"*

Aliĝo 3.500 pesetoj. Gejunuloj ĝis 20 j. **senpage!**

En kompleta pensio : 4.000/5.000 pesetoj tage.

Kontaktadreso : Fervoja E-Asocio, Apartat 15027,

E-08080, Barcelono. (Sub aŭspicioj de *Hispana E-Muzeo*).

**...kaj vizitu Balagué ĵus antaŭe aŭ tuj poste,**

**aŭ iam ajn, tuj resendante la jenan aliĝilon al**

**Hejmoj, Foyer de Culture Intern., F-09800 Balagué**

FAMILIA NOMO :  
PERSONA («antaŭa») NOMO :  
ADRESO (MAJUSKLE ! ) :

Poŝtkodo : URBO :  
(Laŭplaĉe) Telefonnumero :  
Retpoŝta adreso :

LANDO :  
Telefaksnombro :

- Mi planas veni al Balagué : Jes / Ne ; de la ĝis la
- ( Ĉi-kaze mi skribos du semajnojn antaŭ mia alveno por konfirmi ĝin. )
- Mi bezonas aŭton por alveni de Saint-Girons. Planita alvena horo :
- ( Ĉi-kaze mi telefonos la antaŭan tagon por konfirmi la horon. )
- Mi konscias pri la malkomforteco kaj pretas partopreni en la agadoj.
- Mi havas propran asekuron pri persona respondeco kaze de akcidento.

Subskribo :

Dato :

## Historiaj esploroj

### "Orkidea Esperantujo"

La Universalaj Geviroj\* celas kunvenigi tiujn kiuj sin interesas pri la temo : fari nin ĉiujn fortaj kaj ekonomie kaj anime. La Universalaj Geviroj invitas ĉiujn kiuj havas ideojn kiuj kontribuos al la riĉigo de la komuna bono ; ĉiun kiu deziras esti libera sed ne kapablas realigi tion sola (...) Ni intencas (???)sti Esperanton al praktika utiligo (...)

Sekve al ĉi tia penso ni aĉetis pecon da bieno en la insulo Saipan kun la intenco konstrui nian propran domon por komunloko de renkontiĝo, lernejo, laborejo, ripozejo, haveno... La domo nomiĝas la "Paradiza Hejmo". La *Paradiza Hejmo* garantios al ĉiu loĝanto vivon sendependan sed intiman en ĉirkaŭaĵo de laboro, studo kaj distriĝo. Esperanto regos la komunumon kaj unuigos ĉiujn anojn.

La karakteroj de *Paradiza Hejmo* estos jenaj : kiel eble plej ekonomia, kiel eble plej granda kaj komforta (...) La klimato de Saipan estas preskaŭ sama kiel tio de Havajo.

Ni ankaŭ havas unu vakantan insulon ekspluatotan, kiu apartenas al unu el niaj samideanoj. Multaj pli estas disponeblaj nur se ni havas sufiĉe bonajn ideojn kaj povas provizi nin per sufiĉa ekonomia forto (...)

Supozu ke [al] ni eblas doni al vi ĉion, se vi bonvolus dediĉi al ni vian liberan tempon por la realigo de ĉi tiu praktika sonĝo por "Geviroj". Se vi kredas ke vi volonte povas kunlabori kun ni mi havas tutan konfidon en via esperantista koro (...) Mi forte esperas ke vi komprenas niajn intencojn. Ni klopodas unuigi ĉiujn inteligentajn pensulojn sen naciaj, rasaj, religiaj, ideologiaj baroj (...)

Nun ni havas apogon de la Registaro de "Northern Marianas Isl.". Nia disvastiĝo estas malrapida sed absolute en la normo [?] de libera elekto nur por geviroj kun tiaj animoj. Se vi komprenas ĝin, vi estos bonvena (...)

Nun ni ne havas monon por inviti vin ĉi tien, sed havas senfinan apogon kaj monon por projektoj bone finitaj. (Tri projektoj estas en tre avanca fazo de realiĝo).

(...) Mi estas **Bruno Della Pozza\*\***, sekretario kaj "patro" de la *Universalaj Geviroj*.

\* Mi deziras specifi ke "Geviroj" signifas 1/ *Ge* : montranta ke la preparolata grupo konsistas el ambaŭ seksoj ; 2/ *viro* : "brava, kuraĝa, plenkreska, frukta homo" (vidu *Plena Ilustrita Vortaro*, p.1193).

\*\* *Orkidea Esperantujo*, Box 607, Zamenhof str., Saipan, MP 96950 USA (Adreso validis almenaŭ ĝis 93)

### Antaŭ la mondmilito : "Esperio"\*

(...) Vivi naturisme, praktikadi esperanton en libera etoso, tion faris pionire la kreintoj kaj membroj de la komunumo Esperio apud Valenco-en-Aĝenio (Valence d'Agen, departemento Tarn-Garonio, Francio), antaŭ la dua mondmilito. *Esperio* estis kreita de pluraj SAT-anoj, i.a. k-doj Kario Vigier, Paŭlo Fousset, Georgo Lebec...

Kiel do vivis tiuj pioniroj ? Laŭ kelkaj tiamaj Valencanoj la komunumanoj manĝis nur herbon ! Simila antaŭjuĝo ankoraŭ nun regas pri la vegetaranoj, tiuj ekskluzivaj laktuk-manĝantoj ! Verdire kiel multaj naturistoj, la Esperianoj ne estis sektanoj. Al novalvenintoj ili ne trudis severan dieton !

Ĉiu membro posedis propran bieneton, kiun li mem prizorgis, produktante preskaŭ ĉiujn necesajn nutraĵojn, legomojn kaj fruktojn. Kompreneble pro sia naturista vivo la Esperianoj ne multe elspezis por siaj vestaĵoj. Sed la komunumanoj havis normalajn rilatojn kun la ĉirkaŭa socio. Ili ricevis la pacistajn kaj esperantistajn revuojn, aĉetis iujn varojn ĉe la butikoj de la vilaĝo. Por akiri la necesan monon ĉiu lernis metion. Iu prilaboris junkon, tiu ledon, alia makleris. Kelkaj helpis la lokajn kamparanojn en ties taskoj.

*Esperio* estis konkreta ekzemplo, grandparte sukcesa eksperimento kun la altidealaj celoj kiujn oni trovas en SAT. La Esperianoj, viroj kaj virinoj, estis ja diversnacia kaj uzis esperanton kiel ĉiutagan interkomprenilon inter gekamaradoj, kiuj ne nur interhelpis unu la alian, sed edukis, kulturis sin inter si per libera diskutado, legado, muzikado...

La mondmilito alvenis. La eksterlandanoj, membroj de *Esperio*, foriris malproksimen. Iuj eĉ ĝis Kanado... **Esperio mortis. Sed ne la idealo**, kiun konservis vigla ĝis sia morto k-do Karlo Vigier kaj k-do Georgo Lebec. Ĉi-lastaj, en la jaroj '70, aĉetis kaj riparis domon, tre proksime de la iama bieno kiun prizorgis la Esperianoj.

Tiu idealo, kiun ni SAT-anoj trovas en nia asocio kaj feliĉe ankaŭ en la nunaj komunumoj de liberamantoj, naturistoj, militrifuzantoj, al kiuj mankas nur la universala lingvo por fariĝi aŭtentikaj mondcivitanoj.

**Kribo**

\* Kiel sekvo de *Hejmoj* n-ro 6 p. 5 .

Tio ĉi aperis en "*Komuna Informilo*" n-ro 2 de dec. 1973, eld. de *Amika Esperanto-Rondo por la laborista esperantistaro en Akvitanio*. Tiu "informilo" fariĝos "*Laŭte*" en 1975 kaj internaciigos en 1978 (post la malapero de "*La Juna Penso*", heredinte ties "formulon").

**Kiel sekvo de "Hejmoj" n-ro 7 p.4**

Bona Espero, 03-03-1996

(...) Antaŭ pluraj jaroj, veturante suden al Sao Paulo, ni haltis en Catalao por serĉi la spurojn de tiu kolonio. La donacinto de la grundo, la belg-devena samideano Deckers, ne plu vivis; sed ni kontaktis unu el liaj tiutempaj amikoj kiu fakte sciis pri la ideo de tiu kolonio, kiu tamen ne konkretiĝis. Plej verŝajne pro la eksplodo de la dua mond-milito.

Sur la tereno kiun li intencis donaci, "Chacara do Sol", oni poste konstruis la urban futbal-stadionon, ĉar dum la lastaj kvindek jaroj la vilaĝo evoluis al sufiĉe granda urbo, precipe post la konstruado de fervojo kaj de la ĉefurbo Brasilia.

Estus interese scii, ĉu ankoraŭ vivas kelkaj el tiuj kandidatoj koloniistoj menciitaj en la artikolo (dudek kvin personoj el ses diversaj landoj). Estas ĉiukaze rimarkinde, ke la sama nomo "Bona Espero" estis poste uzita en 1957 de la fondintoj de la nuna Bona Espero, sen ke ili konis la precedenton.

(...) Mi plej kore salutas vin ankaŭ je nomo de la ceteraj bonesperanoj.

Giuseppe Grattapaglia

**Kolonio « Bona Espero »****S-ano BRAGA KUNHELPIS AL LA FONDO DE ESPERANTO-KOLONIO EN BRAZILIO.**

Certe vi legis la artikolon pri la Esperanto-kolonio fondota en Brazilo. Kaj jam hodiaŭ ni povas sciigi la tutan esperantistaron, ke ni ricevis el Brazilo la sciigon, ke s-ano Braga, la konata probatalanto por nia movado, havis sukceson ĉe la brazila ministrejo por eksterlandaj aferoj, ricevante la enirpermesojn por la unuaj koloniistoj de la unua Esperanto-kolonio en la mondo, de la kolonio « Bona Espero ».

Kvankam ni ĝis hodiaŭ ne scias, kiam ni — la unuaj koloniistoj, ĉ. 25 personoj el 6 diversaj landoj — povos forveturi, tamen tiu ĉi sukceso de s-ano Braga estas granda antaŭenpaŝo.

Publike mi dankas al s-ano Braga en la nomo de la nun fondita kolonio pro la helppreteco de li pruvita. Lia nomo ĉiam estos kunligita kun la Esperanto-kolonio en Brazilo.

Samajn grandajn servojn faris por la kolonio s-ano Deckers, Catalão (Brazilo), kiu elpensis la projekton de la kolonio, kiu dum preskaŭ du jaroj laboris por la realigo de la fondo, kiu ne timis monelspezojn kaj ne perdis la kuraĝon ĝis la nuna sukceso. Ankaŭ al li koran dankon! Dankon ankaŭ al li pro la de lia posedajo donita tereno, kiu estos la fonduso de la kolonio.

Estas la devo de la samideanoj en la tuta mondo, sendi dankleterojn al s-ano Braga, Rio de Janeiro (Brazilo), rua José Vicente 79, kaj

al s-ano Deckers, Catalão (Goyaz, Brazilo), Chacara do Sol.

Komenciĝas en nia movado tute nova epoko! Dum kiam en kelkaj landoj oni malpermesis kaj eble en aliaj malpermesos la Esperanto-organizaĵojn, dum oni enkarcerigas samideanojn nur pro sia aneco al nia movado, dum la tuta mondo febre armas kaj preparas novan te.uran mond-militon, dum malaperas ŝtatoj de la lanckarto, estas fondata paca angulo, flanke de la militema mondo.

Ĝis nun nur sonĝo, sed baldaŭ realeco, vera Esperantujo, — unue malgranda kolonio, sed poste ĉiam pli grandigota.

Tie ĉe Catalão samideanoj el diversaj landoj kunvivis kaj inter si nur parolos nian karan lingvon. La tuta Esperanto-movado turnos la okulojn al tiu ĉi punkto de la tero dum la venontaj monatoj kaj jaroj, kaj ĉiuj veraj samideanoj atentos kun intereso la sciigojn pri la kolonio.

Ni scias, ke ni havas antaŭ ni treege malfacilan laboron. Ni devos konstrui domojn por ni, ni devos prilabori la ĝis nun ne kulturitajn kampojn, ni devos serĉi aĉetantojn por la produktoj de niaj kampoj ktp., ktp. Sed tamen ni tre volonte faros tiujn ĉi laborojn. ĉar ni esperas, ke ni povos vivi tute trankvile, sen militdanĝero, sen la danĝero, esti enkarcerigitaj pro nia kredo al nia ideo. Antaŭ ni ĉiam flirtos la standardo de nia verda stelo kaj ni ĉiam pensos al la vortoj de nia majstro: En la mondon venis nova sento! La interna ideo estu inter ni!!

Al la samideanoj en ĉiuj landoj de la terglobo ni vokas: Helpu al ni!! Kolektu monon por la Esperanto-kolonio! Se ĉiu nur donos kelkajn centimojn, ni estos treege dankemaj kaj ni akceptas ankaŭ la plej malgrandan sumon. La kolonio havas bankkonton ĉe la: Amsterdamsche Bank N. V., Amsterdam C., sub la nomo: Kolonio « Bona Espero ».

Verdegiano 2.

29-1-1996 *Ne en Esperanto sed en la konkurenca Esperanto Internacia (monata organo de Internacia Esperanto-Ligo) de junio 1939 mi trovis la ĉi-supre fotokopiitan artikolon. La antaŭa kajero [do: de majo 1939] sobre anoncis:*

" **Esperanto-kolonio « Bona Espero »** estas fondita ĉe la urbo Catalao en la brazila ŝtato Goiaz. Fondinto estas belga inĝeniero s-ro Deckers, kiu jam delonge loĝas en Catalao kaj bone konas la cirkonstancojn. Aliĝis jam 60 interesuloj el diversaj landoj."

*Momente jen ĉio pri la temo (...)*

Jean Amoureux

# Krima misuzo de ekologia kaj esperanta idearoj kolapsigis *Mondhejmo*-n

*Mondhejmo* (MH), *Ekologia Centro Internacia kun Esperanto kiel Oficiala Lingvo*, estis fondita en 1986 kun la enstatutigitaj celoj organizi staĝojn kaj renkontiĝojn pri ekologio kaj/aŭ la internacia lingvo. La organizaĵo, al kiu komence membriĝis pli ol sepdek anoj, trovis ruinojn en la forlasita vilaĝo Cauduro en Hérault, Sudfrancio, el kiuj oni konstruis novan domon duetaĝan.

Dum la sepjara konstrufazo de la hejmo, ĉefe prizorgita de s-ro Akiles Sanz, kiu en unu aŭ alia funkcio ĉiam estis ankaŭ en la organizaĵa estraro de MH, montriĝis diversaj grupoj inter la MH-anoj.

Laŭ "ideologiaj" vidpunktoj estis tri :

1/ Purisma frakcio, kiu strikte apogis sin sur io kion ĝi estimis racia, kaj kiu strikte agadis laŭ io kion ĝis estimis ekologia. Ĉi tiuj tricentprocentaj reduktistoj konsistis el la ĉefo, s-ro Sanz, kaj ties prozelitoj.

2/ Holisma frakcio, kiu krom racio kaj plenumado de eksteraj ekologiaj devoj inkludis metafizikajn aspektojn en siaj pensado kaj agado. Ĉi tiuj tutistoj konsistis el la plejmulto de la virinoj.

3/ Liberpensa frakcio, kiu eksplicite kontraŭis la ekstremismon subpreman de la unua, kaj eksplicite akceptis la ideologion de la dua kiel unu eblon inter multaj. Ĉi tiuj ekolibereuloj konsistis ĉefe el MH-ano W. Gunther, ties Kasselaj amikoj kaj kelkaj aliaj el la organizaĵo.

Laŭ praktikaj vidpunktoj, estis du grupoj :

1/ La ripozdomuloj kiuj fakte evoluigis MH-n en la direkto de sanatorio por ĉefe ripozemaj plenkreskuloj. Al tiu grupo apartenis anoj el ĉiu de la tri ideologiaj grupoj.

2/ La laŭstatutuloj, kiuj eksplicite volis evoluigi MH-n al domo en kiu oni prezentu kursojn kaj kunvenojn ekologio- kaj esperanto-temajn. Ĉefe Gunther, lia edzino kaj kelkaj el la ĉefe virina holisma frakcio apartenis al tiu grupo.

Dum la konstruado la plejmulto de la MH-anoj loĝis la lokon en Cauduro, kaj multaj kunhelpis permone kaj permane. Aparte la Kasselaj MH-anoj subtenis la projekton konstante per abundo da mono, manoj kaj materialoj. Spite al tio la konfrontado inter la membroj akriĝis tiel ke unue ĉiuj virinoj kiuj persone kontaktiĝis kun s-ro Sanz kaj liaj altrudemaj tezoj, fine forlasis la organizaĵon. Due, multaj viroj, kiuj iom pli serale devis kunlabori kun Sanz, malesperis kaj ĉesis helpi. Restis kiel opozicio nur la dekomencaj kompetentuloj pri la projekto, Gunther kaj la Kasselanoj, fakte ĝuste pro la nekompreneble ekscesaj intelekta kaj praktika nesufiĉoj de s-ro Sanz kaj de ties tricentprocentaj ekologiaĉaj disĉiploj.

Ni el Kassel ne emis forlasi la projekton, ĉar ni kredas ke raciema kaj pozitiva politiko povas elteni diferencojn se ĉiu klopodas lastinstance subteni la superajn enstatutigitajn celojn. Ni eĉ en 1994 proponis

ekologian staĝon en esperanto por la jaro 1995 kaj estis malakceptitaj de s-ro Sanz per la argumento ke la domo ankoraŭ ne estis finkonstruita – spite al la fakto ke mankis nur kelkaj instalaĵoj en la unua etaĝo. Vera solidareco de supre koncerne la esencon de la propra statuto do absolute forestis en la organizaĵo.

Fine s-ro Sanz kaj liaj helpuloj (ĉefe familianoj) komprenis ke ili ne povis alproprigi al si la tuton per atendado de nia fina cedo. Ili sekrete, t.e. sen iu aperta komuna diskuto pri la afero, iniciatis skriban referendumon pri la malfondo de la organizaĵo per la argumento ke la projekto ne evoluis kiel atendite, kaj simile, kaj ke oni pli bone transdonu la Hejmon al li, kompensante nin en Kassel kaj kelkajn aliajn per mono. La **referendumo gajnis la geSanzojn**, ĉefe, kiel ni intertempe eksciis, pro la fakto ke la plejmulto de la francaj anoj ne interesiĝis pri la kvereloj inter la MH-anoj.

Laŭ niaj provizoraj informoj en Francio per germana advokata servo la tuta procedo de s-ro Akiles Sanz kaj liaj kunhelpuloj estas **kontraŭleĝa, ankaŭ laŭ la franca leĝo**. Nur la faktoj ke 1<sup>e</sup>/ ni en FRG estas tiom malproksimaj de Cauduro, 2<sup>e</sup>/ ke en Francio la antaŭpagendaj advokataj kostoj estas sufiĉe pli altaj ol en Germanio, kaj 3<sup>e</sup>/ ke, eĉ se ni gajnus ion, niaj edzinoj fakte malpermesis al ni pluan kunlaboron kun abomeninduloj kiel la geSanzoj, malhelpis min pludaŭrigi laboron en la projekto.

Ni ĉiuj fakte estas absolute konvinkitaj ke ĉi-kaze temas pri krima, t.e. fraŭda alproprigo de komuna propraĵo flanke de privatuloj. Estas ja tiel, ke Sanz nun posedas privatan sanatorion. Por ni la naŭzige malagrabra afero estas nun oficiale finita. Sed restas kompreneble grava private likvidenda fakturo. La plena krima aspekto de la afero ankaŭ evidentiĝas el la fakto ke **la financa kompensado, oficiale decidita laŭ la antaŭkondiĉoj de la referendumo, nun efektive ne okazas**. La tuto montriĝas kiel profunda prostituciigo de la ekologia kaj esperanta ideoj.

Fine por klarigi la anoncon en *Hejmoj* n-ro 7 p.1 : Ĝi, kiel poŝta artaĵo, certgrade resumas la malhelpojn kaj miskondiĉojn groteske ridindajn, profunde neeltenblajn kaj politike absolute neadekvatajn, kaŭzitaĵojn pro la konduto de la konstanta prizorgulo kaj domkonstruisto de MH. (...) Homoj ne povas elteni, se bigotulo parolas grandvorte pri pacifismo kaj konstante skoldaĉas kunulojn pro bagatelajoj (...) kaj neniu povas elteni kvazaŭ diktatore regatan ordon de unuopulo ktp., ktp. Estas sufiĉe multaj homoj tro malfortaj aŭ tro fieraj por reagi al tiaj kondukmanieroj escepte per foriro. Intertempe eĉ la plej eltenemaj el ni konstatis : s-ro Akiles Sanz estas en la plej malbona kompanio – li estas sola !

D-ro W. Gunther (4-1-1996)

## **Mondhejmo fariĝis privata sanatorio por Berlina pensiulo**

Laŭ la opinio de la Kassela grupo (Germanio) de eksa *Mondhejmo* (en Cauduro, Hérault, Sudfrancio), la malfondo de MH flanke de s-ro Akiles Sanz kaj ties subtenuloj, estas krima akto, nenio alia ol evidenta fraŭdo, **kontraŭleĝa** laŭ germana, franca kaj eŭropa leĝoj. Ĝi okazis post kiam la domo estis preskaŭ finkonstruita kaj post kiam s-ro Sanz dum la jaroj 1994-95 laboris en Berlino cele kompletigon de la antaŭkondiĉoj por sia pensio.

La nuna celkonforma alproprigo de komuna propraĵo (MH), flanke de tiu privatpersono Sanz, okazis sen iu aparta grava baza diskuto inter la MH-anoj, kontraŭ la eksplicita volo de la gekasselanoj (el FRG), kaj laŭ skriba referendumo kiu estis efektiva ruzajo, utiligante la nescion de la plejmulto inter la MH-anoj. Kiuj voĉdonis en la trompa kaj trompiga referendumo, tiuj estis MH-anoj, ĉefe francaj, kiuj estis aŭ tute ne aŭ absolute unupartie informitaj : tiel ke ili pli volonte malfondis la organizadon ol fariĝi parto en la kvereloj kiujn ili ne konis kaj ne volis koni. Kun plena certeco tiu procedo nur eblis al Sanz ĉar MH situas en Francio kaj la juraj kondiĉoj estas sufiĉe komplike maneĝeblaj el tiom fora loko kiel Kassel, FRG.

Krom sufiĉe krima, ni rigardas la metodon de la Sanza bando kontraŭdemokratia, kontraŭfrateca, malama kaj neracia. S-ro Sanz montriĝis kiel individuo kiu ne kapablas esti libera inter liberuloj. Li, dum la jaroj, foririgis la plejmulton de la MH-anoj : unue la virinojn, kiuj evidente laŭ sia sesa sentumo pli frue ekkonis la fuŝnaturon de tiu egocentrulo. Kion li bezonas, tio estas prozelitoj, dependaj disĉiploj kaj ne liberaj fratoj. "*Frato fraton ŝakale atakas*", diris Zamenhof. Sanz estas la taŭga viva modelo.

La ŝtelpetanto kaj petŝtelisto de MH, s-ro Akiles Sanz, skribis : "*En Mondhejmo regas frateco, amo kaj racio. Ni ne volas esti ŝajne feliĉaj je la kosto de aliaj*". Kion li volis reale diri estas : "*En Mondhejmo regas mia frateco, mia amo kaj mia racio. Vi ne estu feliĉaj je miaj kostoj !*" Preskaŭ ĉiuj el ni sciis pri kaj sufiĉe ofte kritikis pro tiaj egoismaj trajtoj de Sanz, sed efektive ĉiam donis krediton al li pro la fakto ke li estis la konstanta prizorgulo kaj ĉefa konstruisto de la domo. Sed tio por li ja evidente ne sufiĉis. Tiu malkuraĝulo evitis ĉian decidan diskuton-disputon kaj agadis ĉefe kaj sekrete je la kostoj de aliaj. Li absolute ne disponas pri virtoj fratece, ame kaj racie kunlabori. Li havas nur dependulojn, ne fratojn. (Se mi eraras kaj se estas iu persono kiu rigardas s-ron Akiles Sanz frato, bonvolu kontakti min, letere aŭ publike !)

Rimarkinda estas la fakto ke la unua vorto kiun Sanz uzis en la unua informilo pri *Mondhejmo*, estis la vorto "*Mi*" : "*Mi ne volas florojn sur mia tombo, sed dum mia vivo*", li diris. Li nun (ŝajne) atingis tiun ĉi celon. *Mondhejmo* fariĝis lia privata paradiza sanatorio. Li ne trompiĝu !

**W. Gunther** (Schulstr. 7, D-34292 Ahnatal-Weimar)



**ĉe la domparo**  
internacia feria altlernejo  
de kultura centro esperantista

96 01 30

Kara kolego,

En *Hejmoj* n-ro 7 p.11 ni legis pri la propono "*kontaktiĝi kun la nuntempa respondeculino pri Gastejo Edmond Privat, en La Chaux-de-Fonds, kies celo estis, almenaŭ origine, sufiĉe proksima al la idealo de HIK*". Eble interesos vin klarigo pri la diversaj Esperanto-establoj en Ĉaŭdefono.

– CELI (*Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia*) : Fondite en 1967, ĝi estas sekcio de la Urba Biblioteko (...), unu el la diversaj specialaj fakoj, kie laboras kaj profesia bibliotekisto kaj volontuloj. Ĝi havas propran (...) arkiviston, s-ron Claude Gacond...

– KCE (*Kultura Centro Esperantista*) : Fondite en 1968 (...) La prez. estas G. Silber, la vicprez. D. Buhlmann (...) Ĝi estas transnacia altlernejo en esperanto (ĉe *La Domparo*). KCE luas kvin apartementojn kaj alion ĉe *Gastejo Edmond Privat* (...) Ĉe *La Domparo* povas loĝi 17 personoj.

– GEP (*Gastejo Edmond Privat*) : Fondite en 1976, ĝi estas fondumo (...) kiu praktike estas nenio pli ol demposedanto/domadministranto...

– LF-KOOP (*Kooperativo de Literatura Foiro*) : Fondite en 1980, ĝi estas eldon-kooperativo (...) Ĝi produktas revuojn, librojn, diskojn, kasedojn, filmojn, konkursojn, aranĝojn, kursojn...

Surbaze de tiu klarigo, verŝajne ne GEP sed KCE estas via eventuala interparolonto.

Samloke ni trovis aludon ankaŭ al Grezijono. Eble interesos vin rilati ankaŭ al la *Kvinpetalo*, la internacia stagejo de *LF-Koop* en Bouresse ; ĝin mastrumas *Societo Yvonne Martinot*, kaj ties prezidanto Georges La Grange estas ankaŭ estrarano de KCE. *Ĉe la Domparo* konsideras *La Kvinpetalon* sia adopta frato : ili organizas kursojn pri Esperanto (kiel ni), kaj same kiel ni ili kontribuas al la kvalita kresko de Esperanto kiel kulturlingvo. Diferenco estas ke *La Kvinpetalo* orientiĝas al la formado de aktivuloj por la E-komunumo (...) Ambaŭ kulturcentroj konsideras Esperanton kvaŭzaŭ diaspora lingva minoritato.

Kun simpatio vin salutas **Tamàs Szabó**  
komisie de la Komitato [de KCE]

# La « *Blua Domo* »

(Laŭ la melodio de fama franca kanto de Maxime Leforestier « *C'est une maison bleue...* »)



Ĝi estis blua dom',  
meze de sud-franca val'.  
Iam ĝia nom',  
fama en la mond',  
estis la simbol'  
de la liberec' !

Sed tie nur mallonge  
daŭris la komunum'.

\*  
\* \*

Ĉar jam post unu jar'  
estis temp' de translokiĝ'  
en pli granda dom',  
la paroĥestrej'  
de la vilaĝet'  
funde de la val'.

Kaj tie ĉi ja longe  
daŭros la komunum'.

Ne estas bluaj do  
la fenestroj de la dom'.  
Sed ĝi taŭgas pli :  
en ĝi estas lok'  
por tri, kvin, ses, ok !  
ja, ne estas lim'...

Do venu, geamikoj,  
al via nova hejm' !

\*  
\* \*

Ni rekonstruos ĝin  
laŭ malnova Amikej',  
tiu de Gustave\*  
en mil naŭcent ok,  
kiu ĉesis nur  
pro la mondmilit'.

Denove estos hejmo  
por ci, esperantist'.

\* Gustave Roy, fondinto de « *Amikejo* » la 13-an de aŭgusto 1908 en Moresneto, tiam neŭtrala teritorio inter Belgio, Germanio kaj Nederlando. Li estis instruisto en Saint-Girons, malpli ol 15 kilometrojn for de la Arrout-a « *Blua Domo* » kaj de la paroĥestrejo de Balagué.